

# LA PROGRESO

ĈEĤOSLOVAKA ORGANO ESPERANTISTA. ★ ĈESKOSLOVENSKÝ LIST ESPERANTSKÝ

Aperas monate. Jara abono Kč 20.—, eksterlande Kč 25.— (por 10 numeroj). Specimen-numeroj Kč 2.— aŭ 2 resp. kuponoj. — Redakcio: Plzeň, Radyňská ul. 10. — Administreto: Frant. Kavan, komercisto, Plzeň, Poděbradova tř. 6. — Konto de la Poŝta ŝparkaso no. 169.352. — Telefono: 732/VI. — La manuskriptojn oni ne resendadas.

## NIA XIII. KONGRESO.

Nia XIII. universala Kongreso apartenas al tempo estinta kaj ni esperas ke ĉiuj partoprenintoj de ĝiaj solenaj tagoj konservos ĝin en bona memoro. Ĉefe tiuj samideanoj, kiuj ĝis nun ne havis la okazon partopreni nian mondkongreson, certe dum sia tuta vivo ne forgesos la feliĉajn momentojn dum la XIII. en Praha travivitajn.

Tiu dolĉa, stranga impresio, kiun havis la partoprenanto trovanta sin en tiu grandega amaso da diversnaciaj homoj, kiuj en sia hejmo parolas plej diversajn lingvojn kaj dialektojn, kiuj alvenis ĉi tien el multaj landoj kaj anguloj de la terglobo kaj ĉi tie reciproke komprenigis sin per unusola — fratiga lingvo, vere tiu impresio neniam povas foriri el animo nur iom sentema. Ĉie, en la tuta amaso estis nur samideanoj — kvazaŭ fratoj kaj preskaŭ ne ekzistis tiuj, kiuj atentis, ke tie estas francoj aŭ germanoj, bulgaroj kaj serboj, hungaroj kaj rumanoj, ĉeĥoj kaj germanoj. La »interna ideo« forviŝis la maldolĉecon kaŭzitan de la mondmilito.

Kvazaŭ nekonscie venas la imago kiel bela estus la vivo, se regus ĉie nur esperantismo kun sia unuiga lingvo kaj sia »interna ideo« kaj sentema observanto kliniĝas antaŭ la admirinda verko de tiu, kiu ne plu ĉeestos la universalajn manifestaciojn de la esperantistoj, de tiu, kiu ripozas en eterna dormo tie en la trankvila tombejo de Warszawa...

Tia estas la ĝenerala impresio. Se ni memoras la detalojn de la tuta aranĝo, ni povas nur profunde danki al tiuj, kiuj ne ŝparis laboron eĉ tempon por agrabligi al ni la tempon en Praha travivitan. En du, tri gazetoj ni legis eĉ riproĉojn al la L. K. K., sed al ni ŝajnas, ke ili estas tute maljustaj kaj evidente tendencaj. Se jen kaj tie okazis difektoj aŭ difektetoj, tiam ili estis tute hazardaj kaj sekve riproĉi ilin al la aranĝantoj de la kongreso, kiuj al ĝi dum kelkaj monatoj dediĉis sian tutan energion, ne estas juste.

La programon de la kongreso la aranĝantoj elektis tre zorge kaj eĉ plej severa kritikisto ne povas trovi riproĉojn. Ĉefe la amuza parto estis eminenta. Tiu, kiu partoprenis la vesperajn koncertojn, kostumbalon kaj la teatran prezentadon neniel povis esti malkontenta. Kaj tial: sinceran dankon al Vi, bravaj samideanoj tie en Praha, por Via grandega laboro kiun al Vi kaŭzis la aranĝado de la Dektria!

Jam sabaton vespere, la 30. jul. koncentriĝis en Praha la plej granda parto de la kongresanoj. Ili kunvenis je la 19. horo en la kongresejo sur Žofín, kie okazis la interkonatiga vespero.

Dimanĉe, la 31. post la 14. horo komenciĝis en Reprezenta domo de Praha nekutime vigla vivo: ĉi tien alvenadis samideanoj unuope eĉ en malgrandaj aroj por partopreni la solenan malfermon de la kongreso. Estis videblaj famaj, jam grizigintaj pioniroj de nia movado apud junaj kaj junetaj ĝiaj adeptoj kaj sur vizaĝo de ĉiuj estis rimarkebla soleco de la momentoj alvenontaj. La vastega kaj luksa Halo de Smetana rapide pleniĝis de diverslanda esperantistaro. Antaŭe fremdlandanoj, malantaŭe la enlandaj samideanoj. Mi venis kiel raportisto de tagiurnalo »Nová Doba« en Plzeň kaj tial mi atendis en la vestiblo la alvenon de la »eminentularo«, observante la unikan bildon, kiu prezentigis antaŭ miaj okuloj. Jen venas sinjoro al mi, demandante pri la loko por ĵurnalistoj. Ni prezentas nin reciproke: Ellersiek — Tittl. la konataj gazetmalamikoj. Kia »agrabla« hazardo! Ni ridas laŭte, premas al ni reciproke la manojn kaj foriras por okupi nian lokon ĉe la ĵurnalista tablo...

Dume la halo estas jam tute plene. La balkonoj, galerioj, loĝioj, sidlokoj en parteroj, ĉio estas jam okupita kaj ĉiam ankoraŭ venas novaj kaj novaj aroj. Ili lokumiĝas kie nur estas eble kaj el la estrado oni vidas kapon apud kapo, de la planko ĝis al la plafono. La bruo tie ĉi reganta subite ĉesas: Sur la estradon, kie vidiĝas marmora busto de Majstro

Zamenhof, ĉirkaŭita de tropikaj plantaĵoj, venas reprezentantoj de Ĉeĥoslovaka respubliko, de urbo Praha, de diversaj registaroj, internaciaj institucioj, la honora komitato kaj la labora komitato de la kongreso ktp. La silento estas rompita per majestaj sonoj de nia himno »La Espero«, venantaj el admirinda orgeno kiu okupas tutan fruntan muron de la halo. Tuta ĉeestantaĵo starante kantas kune. Kvankam mi ĉeestis jam multe da diversaj solenaj okazoj, neniu ĝis nun faris al mi tiel grandiozan, nepriskribeblan impreson, kiel mi sentis ĉi tie. La sonoj de majesta orgeno regata de eminenta virtuozo prof. Wiedermann el Praha miksitaj kun kanto venanta el miloj da gorĝoj ŝajnis, ke efektive la »nova sento« venis al ni, ke inter ni estas la spirito de nobla Zamenhof, ke en la aero flugpendas ia stranga potenco, kiu nin fortigas por la nova laboro...

So. Isbrücker, la prezidinto de la antaŭa kongreso malfermas la kunsidon je la 15. h. 15 min. kaj mencias la mortintan kunlaboranton de Zamenhof dron. Antoni Grabovski. La ĉeestintoj aŭskultas la mencion starante. Poste li proponas en la nomo de K. K. K. la estraron, kiu konsistas jene: Honoraj prezidantoj: generalo Sebert el Parizo, kiu pro malsano ne ĉeestas, dro. Šusta, ĉs. ministro de popoleduko, kaj ing. Rotnágl, vicurbestro de Praha. Prezidanto: prof. dro. Kamarýt el Bratislava. Vicprez.: J. M. Warden kaj dro. H. Arnhold. Gen. sekretario: Aŭg. Pitlík. Sekretariinoj: Sino. E. F. Cense, sekret. de Centra of. esp. en Parizo kaj fino, Šupichová en Praha.

Dro. Kamarýt akceptante la prezidantecon salutas la ĉeestantan sinon. Zamenhof, kiu kaŝe sidas en supra loĝio, poste la reprezentanton de ĉs. registaro min. Šusta kaj la vicurbestron ing. Rotnágl. Dr. Šusta respondas, ke la ĉs. registro ĝojas, ke la kongreso okazas en tiu ĉi ŝtato kaj en malnova Praha. Li deziras sukceson al la kongreso kaj antaŭvidas ĝian resonon en la tuta respubliko. Simile parolas ankaŭ ing. Rotnágl. Poste prezentis dro. Kamarýt vere rimarkindan paroladon pri evoluo kaj nuna ŝtato de nia movado, kiu laŭvorte aperis en »Esperanto« de UEA. sept.-okt. numero. Post li parolis nia eminenta samideano dro. Edm. Privat en la nomo de UEA. Li antaŭ ĉio salutas la ĉs. respublikon kaj al ĉeĥoslovakoj li diras: »Viaj plej famaj herooj ne estis generaloj sed pensuloj. Hus, Komenský, Masaryk estas nomoj honorataj sur la kampo de studado kaj de scienco. Ni respektu ekstaros antaŭ la majstra verko de via Broík, admirante la blankan figuron de via senmorta Jan Hus. — En la kunveno de la Ligo de la Nacioj oni traktis pri la membra aliĝo de la ŝtato, kies ĉefurbo

estas Wien kaj mi neniam forgesos, ke la unua, kiu varme subtenis la aliĝon estis ministro Beneš, modesta viro, juna kaj pli saĝa ol aliaj diplomatoj. Komplimenton al vi, ke vi havas tiajn virojn!« Daŭrigante, li parolis pri UEA, pri niaj taskoj kaj pri dro. Zamenhof. Dolĉe kaj flue pasis liaj vortoj kaj la aŭskultantoj estis kvazaŭ elektrizitaj. Kiam li finis ektondris bruego de aplaŭdoj. Oni sentis, kion por nia movado signifas Edmond Privat.

Nun oni tralegis la leteron de min. Beneš, kiu konfesas siajn simpatiojn al nia movado kaj promesas sian helpon al ĝi. La prezid. proponas forsendon de saluttelegramo al prezid. Masaryk kaj min. Beneš, kio kun aplaŭdo estas akceptita.

Post kvaronhora paŭzo, la oficialaj delegitoj esperante alparolas la publikon laŭ la sekvanta ordo:

Belgujo: S-ro Frans Schoofs, je la nomo de la Ministro de sciencoj kaj artoj; Finlando: S-ro Vilho Setälä, je la nomo de la Finlanda ministro pri instruado; Hispanujo: Majoro Julio Mangada, je la nomo de la Hispana registaro; Italuo: Komandanto Alberto Alessio, je la nomo de la ministro pri maraferoj; Nederlando: S-ro Sevenhuyzen, je la nomo de la ministro pri instruado, artoj kaj sciencoj; Litovujo: S-ro Medem, je la nomo de la ministro por financaj, komercaj kaj industriaj aferoj; Saksujo: S-ro Prof. Fritz Wicke, je la nomo de la registaro, sed precipe pri instruada fako; Ukrainio: S-ro Bockowski, je la nomo de la diplomata misio en Praha; Ligo de Nacioj: S-ro Fuĵisaua, je la nomo de la Vic-Sekretario ĝenerala de la Ligo de Nacioj D-ro Nitobé, kiu alvenas tuj post tiu parolado, kaj mem alparolas la Kongreson per la angla lingvo. Lian paroladon tradukis D-ro Privat. La vortoj de D-ro Nitobé estis varme aplaŭditaj: »Dividitaj ni falas, unuigitaj ni staras.« Saksia esperanta instituto: S-ro Prof. Dieterle, salutas la Kongreson. Jugoslavio: S-ro Bravko Wiegler, je la nomo de la jugoslava ambasadorejo en Praha. Poste venas naciaj esperantistaj delegitoj: Alĝerio: S-ino Tiard. Aŭstralio: S-ro Hudson. Aŭstrujo: S-ro Otto Simon. Britujo: Angla: S-ro Currie; Skotlando: S-ro Kennedy; Kimra lingvo: S-ro Edwards; Irlando: Pastro Parker. Belgujo: F-ino Jennen. Bulgarujo: S-ro Kolev. Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥoslovaka lingvo: S-ro Eisel; germana lingvo: S-ro Scholze. Danujo: S-ro Blicher. Danzig: S-ro Ketterling. Estonujo: Je la nomo de rusoj: S-ro Onofriev. Finlando: S-ro Setälä, je la nomo de finnoj kaj ankaŭ de estonoj. Francujo: S-ro Ernest Archdeacon. Germanujo: D-ro Steche. Por Hebreoj de la tuta mondo: S-ro Heller. Hispanujo: S-ro Victor O. de Allende. Hungarujo: Prelato Giesswein. Italujo: D-ro Fili-

petti. Japanujo: S-ro Shigeo Narita. Jugoslavio: Por Serboj: S-ro Klajic; por Kroatoj: S-ro Kellet. Kanado: S-ro Pratley. Litovujo: S-ro Klimas. Nederlando: S-ro Isbrücker. Norvegujo: S-ro Bonnevie. Polujo: S-ro Leo Belmont. Rumanujo: S-ro Cseh. Svedujo: S-ro Hedström. Svisujo: S-ro Stettler. Usono: S-ro Pleshe. Urugvajo: S-ro Legrand. Blinduloj: S-ro Macan, salutas je la nomo de la Blinduloj. S-ro Kreutz, je la nomo de la Frankfurta foiro ankaŭ salutas la Kongreson kaj atentigas pri la komerca valoro de Esperanto.

Kvankam al la parolintoj oni permesis diri sole kelkajn vortojn, la kunvenego, kies ĉeesto pro sufokanta varmo estis vera sinofero, daŭris ĝis la deknaua horo.

Ĉar la detala priskribo de la kongresa programo aperis jam en gazetoj, kiuj aperas eĉ dum aŭgusto kaj septembro kaj ni scias, ke tre multaj niaj legantoj estas iliaj abonantoj, ĉefe de la »Esperanto« en Genevo, kiu tute detale priskribis la kongreson, mi raportos pri la alia programo nur per ne multaj frazoj:

Dum tri laborkunsidoj la kongreso pritraktis ĉefe la starigon de monumento al dro. Zamenhof sur lia tombo en Varsovio. La propono, kiun prezentis so. Applebaum el Liverpool estis entuziasme akceptita kaj tial jam dum la kongreso oni komencis kolekti monon por tiu celo. Alia tre grava priparolata, sed ne ankoraŭ findecidita punkto estis la problemo pri la internacia organizo de esperantistoj. Post viva diskuto oni akceptis la rezolucion de so. Privat, laŭ kiu oni deziras, ke la komisiono starigita por tiu afero precizigu regularon por atingi unuigon inter U. E. A. kaj la Centra Oficejo en Parizo. Projekto de la regularo aperos en la Oficiala Gazeto kaj esp. gazetoj entreprenos diskutojn pri ĝi. La venonta kongreso poste decidus pri la tuta afero. — Laŭ propono de dro. Privat la kongreso turnos sin al la Ligo de la Nacioj kun la peto rekomendi al siaj anoj enkondukon de Esp. en lernejojn. Krom tio oni petos ĉs. registaron proponi la samon al la venonta kunveno de la Ligo. — Kun varma aprobo estis akceptita la propono de prof. Stejskal pri subteno de porblindula gazeto »Esp. Ligilo« (Esp. gazetoj malfermos monkolektojn por tiu celo.)

La kongresa komitato bone zorgis pri amuza parto de la kongreso: Dimanĉo vespere okazis »interkonatiga vespero« en la granda halo de la kazino sur Žofin, lunde vespere »Akademio de la ĉeĥa kant- kaj muzikarto, korpa eduko kaj naciaj dancoj«, kiu por ĉiu kongresano estis senkompara ĝuo. Vesperon marte oni aranĝis la internacian kostumbalon en Reprezenta domo. La grandega halo de Smetana denove tiam pleniĝis de internacia publiko, kiu grandparte estis vestita per siaj

naciaj kostumoj kaj tial la okuloj de rigardanto apenaŭ povis satiĝi de rigardo je gajaj koloroj de multegaj kostumoj. — Merkrede en la urba teatro de Vinohrady estis prezentata »Nokto sur Karlštejn« de Vrchlický. Mi ne ĉeestis, sed laŭ raportoj de seriozaj gazetoj ankaŭ tiu ĉi distrajo bone sukcesis. — Jaŭde matene forveturigis speciala vagonaro grandan parton de la kongresanoj al la Moravia Karsto, por tie admiri la subterajn belaĵojn. La ekskurso, pro sia longedaŭro kaŭzis iom da peno, tamen la viditaĵoj abunde rekompencis la anvenintojn. La vagonaron, kiu transportis la ekskursantojn, oni nomis rapidvagonaro, sed mi kredas, ke ĝi povis pro sia »rapideco« esti nomata ŝarĝvagonaro. Al junaj kaj bonhumoraj kongresanoj ĝi kaŭzis multe da amuzo, dume kelkaj — danke al dioj ne multaj — murmuremuloj koleris pro longa daŭro de la veturado. — Vendrede la blindaj virtuozaĵoj kaj kantistoj bonege entuziasmigis la kongresanojn en la granda halo sur Žofin per siaj prezentadoj.

Dum la ferma kunsido de la kongreso oni decidis akcepti la inviton de la finlandaj espistoj por la venonta kongreso kaj tial la XIV. okazos en Helsinko. Aplaudis ankaŭ akceptita invito de japanaj samideanoj por la XV. al Tokio.

Pri la kunvenoj de U. E. A. kaj pri la fakaj kunvenoj, okazintaj dum la kongresa semajno ni raportos en venonta numero.

Do, la belegaj tagoj de la XIII. forpasis. Ili longe konserviĝu en la memoro de partoprenintoj. Tie ni povis konstati nian forton, kiu venas sole de nia unueco. Ni restu daŭre fidelaj al tiu forto, kiu nin kunigas. Fidelaj en laboro, fidelaj en la luktado por nia afero. Tiel ni atingos la celon, kiun la »Majstro« starigis antaŭ ni.

B. Tittl.

**Statistiko de kongresanoj.** Al la Kongreso aliĝis entute 2561 kongresanoj. El ili estis el ĉi tiuj 35 landoj: Ĉeĥoslovakio 1406, Germanio 289, Svedlando 111, Francio 91, Aŭstrio 83, Britlando 78, Nederlando 73, Pollando 72, Danio 45, Hungario 45, Italio 45, Bulgario 32, Svislando 32, Jugoslavio 27, Hispanio 27, Belgio 19, Finnlando 14, Norvegio 12, Rumanio 11, Dancigo 6, Ruslando 5, Ukrainio 5, Usono 5, Japanio 5, Argentino 4, Litovio 3, Kanado 3, Aŭstralio 3, Estonio 2, Turkio 2, Kubo 2, Algerio 1, Sudafriko 1, Brazilio 1, Urugvajo 1. — Laŭ partoj de terglobo la statistiko estas: Eŭropo 2533, Ameriko 16, Azio 7, Aŭstralio 3, Afriko 2. — Oni vidas ankaŭ rilaton inter enlandanoj kaj fremdlandanoj: El Ĉeĥoslovakio 1406, ekster Ĉeĥoslovakio 1155. El tiuj ĉi preskaŭ 400 ne petis persone siajn kongresdokumentojn, laŭ kio oni devas juĝi, ke efektive partoprenis 2200 ne kalkulante multajn familianojn sen karto.

oooo

## TUTMONDA MONKOLEKTO POR TOMBŜTONO AL D-RO LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF.

Iniciatintoj kaj Organiza Komitato:

Prof. Th. Cart, Paris. Generalo Sébert, Paris.  
Dro W. Robin, Varsovio. Sro Ed. Stettler, Bern.  
Organiza Komitato: Sro J. M. Warden,  
Edinburgh.

Sro Advokato W. M. Page, Edinburgh 31, Queen Street, Hon. Kasisto. Sro J. D. Applebaum, Liverpool, 11, Mayville Rd., Mossley Hill, Hon. Sekretario.

La supre nomita Internacia Komitato formiĝis por kolekti la bezonatan monsumon per sistemo de kupon-kartoj (vidu apartajn notojn »La projektita plano«) kaj en Varsovio starigis loka komitato, kiu prizorgos, sub la Internacia Komitato, la konstruon de la monumento kaj ĝian konservadon. Ĉe la Kongreso en Praha la sekvanta rezolucio estis proponata en la nomo de la iniciatintoj:

»La XIII-a Kongreso de Esperanto, okazinta en Praha la 1.—6. aŭgusto 1921, decidas, ke estas necese konstrui taŭgan monumenton sur la tombo de Dro L. L. Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, kaj rekomendas la projekton de la Iniciatintoj al la sindona subteno de la tutmonda Esperantistaro.«

La sekvanta alvoko estas direktata al ĉiuj samideanoj kaj simpatiuloj, kun plena konfido kaj kun espero, ke la tutmonda Esperantistaro subtenos ĝin tutkore.

Lazaro Ludoviko Zamenhof estis unu el la ĝenuloj de la mondo. Tion la historio baldaŭ konstatos. Li donis al la homoj la internacian lingvon, Esperanto, kiu jam realigis la malnovan revon je tutmonda lingva kompreno kaj vekis ĉe siaj adeptoj senton de homa interfratiĝado. Lia verko forte enradikiĝis en miloj da koroj tra la tuta mondo, kaj jam portis fruktojn en la rilatoj de homoj el diversaj popoloj kaj lingvoj, rasoj kaj kredoj, kaj en la laboro de sindonaj samideanoj, kiuj entuziasme klopodas ĝin disvastigi.

Ĝis nun lia tombo en la hebrea enterigejo en Varsovio atendas taŭgan monumenton. Dum la lingvo, kiun li kreis, restos por ĉiam la plej nobla monumento, estas dece, ke sur lia lasta ripozejo, la Esperantistoj, kiuj lin amis kaj admiris, starigu monumenton, altrangan je digno kaj edifo, kiu simboligos la amon kaj admiron, kiel lian epokfarantan elpensitaĵon.

La celo de la nuna alvoko estas havigi la subtenon de la Esperantistoj por la monsumo bezonata por tiu unika memoraĵo. Neniu dankema koro detenu sin de la ofero de eĉ sumeto por tiu bela celo. Kiel la Poloj, liaj samlandanoj, alportis el ĉiuj anguloj de sia lando bulojn da tero por monumento al Kosciuszko, la Pola nacia heroo, tiel ankaŭ el ĉiuj anguloj de la mondo ĉiu Esperantisto alportu sian moneron por la konstruo de monumento sur la tombo de la kara Majstro.

Por la desegno de la monumento estos malfermata internacia konkurso kaj la jam stari-

gita komitato en Varsovio prizorgos la konstruigon. La mono kolektita estos uzata por la monumento, kaj, se restos sumo, por alia taŭga memora celo.

La projekto estas aprobita de S-ino Zamenhof kaj la familianoj de la Majstro.

Dependas de vi, Samideanoj, kaj de via bonvolo, ke la supra projekto efektiviĝu. Samideanoj, kiuj deziras sendi mondonacojn rekte al la Hon. Kasisto, povas tion fari en sia nacio mono, kaj kiam la kuponkartoj estos presitaj, ili ricevos kvitance la kartojn aŭ la kuponojn laŭ la sumo donacita.

Por la Iniciatintoj kaj la Organiza Komitato: J. D. Applebaum, Honora Sekretario.

### La projektita plano por tombŝtono.

Monkolekto per sistemo de kupon-kartoj. La Organiza Komitato eldonas kupon-kartojn kun gravurita portreto de la Majstro, kaj kun teksto klariganta la celon.

Ĉiu serio de kartoj havas certan valoron konforme al la malsistemoj kaj la ekonomiaj kondiĉoj de la diversaj landoj. Ekz.: 20 ŝilingoj aŭ svisaj frankoj, 50 frankoj francaj, 100 M. germanaj, k. t. p. La karton ĉirkaŭos 20 kuponoj kun la sama bildo de la Majstro, ĉiu valoranta la dudekonon de la tuta karto. Oni povos do akiri aŭ plenajn kartojn, aŭ nur kelkajn kuponojn. Tio donos la oportunon al ĉiu samideano kunhelpi tiom, kiom li kapblas.

La kartoj kaj kuponoj estas la sola kvitance al la pagintoj.

Kun la afabla helpo de la Naciaj Societoj Esperantistaj kaj de la reprezentantoj de UEA, tiuj kupon-kartoj estas disvendataj inter la Esperantistaro kaj la simpatianoj tra la tuta mondo.

La Organiza Komitato starigos filiojn kaj agentejojn kaj fiksis iliajn kondiĉojn kaj respondecojn. La filioj kaj agentejoj nur vendos plenajn kartojn; la vendadon de kuponoj prizorgos sindonaj samideanoj, kiuj kompanse konservu la mezan parton de la Kupon-karto kun la portreto.

Estos eldonata la kvanto da kupon-kartoj necesa por provizi ĉiujn revendistojn. Post sufiĉa vendo, la nevenditaj plenaj kupon-kartoj estos reprenataj. Ni taksas la bezonon je proksimume 500 funtoj sterlingaj.

La Organiza Komitato aranĝas la tutan kolektadon, okazigas internacian konkurson pri la monumento, ĝin mendas kaj pagas.

La Loka Komitato en Varsovio konstruigas la monumenton kaj zorgos por ĝia konservado.

La Iniciatintoj devas aprobi ĉiujn gravajn decidojn.

La gazeto »Esperanto« kaj aliaj esperantaj ĵurnaloj ricevos regule informojn pri la progreso de la kolekto kaj la spezoj.

La Universalaj Kongresoj de Esperanto decidis pri la raportoj de la Organiza Komitato kaj pri uzado de eble restanta monsumo.

Por la Iniciatintoj kaj la Organiza Komitato: J. D. Applebaum, Honora Sekretario.

## LA XIII. A.

Ne estas facile scii kiom da samideanoj helpis en la preparoj de la dektria sed oni povas diri ke plej labcremaj estis la samideaninoj de la virina rondeto en Praha, kiuj sub gvidado de fino Šupichová, grandnombre helpadis en la ĉiuspecaj prikongresaj laboroj.

En la akceptejoj dum la unuaj kongrestagoj oni trovis grandan aron da gesamideanoj, organizantinoj de la loĝiga sekcio finon. Moudrá kun finoj. Dlouhá, Součková, Kopecká, Kresová, Nesměřáková, Mráčková, Vojtová, Vokřalová, Čížkovská, sojn: ges. Kašpárek, Krottil, Hofman, Wisinger, ges. Kraus, Eiselt, Bischitzký, Kohout, Pitlík, Tůma, Hromada, Netušil, Šafránek, Hercík, Vondruška, Cimr, Ginz, ges. Šídlo kaj aliaj samideanoj kiuj memvole venadis por helpi disdoni la kongresdokumentojn.

Kvankam kelkaj samideanoj venintaj per speciala vagonara el Dresden estis iom malpaciencaj tamen post unu horo posedis jam ĉiuj sian loĝejkarton, sekve oni povas kalkuli ke malgraŭ tio, ke iu spritema samideano en »Esperanto Triumfonta« diras ke la akceptejoj perdis sian kapon tamen eĉ sen la kapo oni disdonis ĉiuminute 6—8 loĝejkartojn al la vojaĝlacaj samideanoj, kiuj per valizoj baris la vojon unu al la alia.

Alian aronĝon tre bone preparitan havis sro. Pele kun so. Krejčí, kiuj zorgis pri la pasportoj. Tage kaj nokte ili laboris por ŝpari al la kongresanoj la serĉadon de policoficejo kaj diversaj konsulejoj.

En la Esperanta poŝtoficejo, sur insulo Žofín vigle laboradis samideaninoj finoj. Hemerová kaj Doubková kun sroj. Tacheci (ĉefo de la oficejo) kaj sro. Hakel, kiuj forekspedis pli ol tridek mil leterojn kaj poŝtkartojn dum la kongressemajno.

Pri amuza fako senlace zorgis fino. Hlavačová, kiu gajvizaĝe aranĝis ĉion necesan por gajigi la ŝvitmalsekiĝintan samideanaron.

Sro. Lukáš kun soj. Valdstein, Brambora, fino Bálková kaj aliaj saimdeanoj gvidis la aranĝan sekcion.

Unuavide malpli rimarkeblan tamen plejgravan laboron por bona sukceso de la kongreso havis nia kelkobla kasisto sro. Novák kun. sia edzino kaj filo Jarĉjo, kiuj helpadis al li en la respond-plena tasko de kongreskasisto. Vere la mono faras miraklojn kaj sen bona funkciado de la kaso oni ne povus aranĝi la kongreson.

Alian utilegan laboron prizorgadis sroj. Weiner, Bouška kaj Pitlík nutrante la ĉiutagajn ĵurnalojn per kongresraportoj kaj propagando por nia idealo, atentigante tiel la neesperantan mondon pri esperanta mondfesto. Efektive dum unu semajno oni ne aŭdis en Praha aliajn vortojn ol esperanto kaj esperantistoj.

Sro. Šilha pacience zorgadis pri ĝenerala propagando kaj pri organizo de fakaj kunvenoj kaj sro. Bohutínský pretigadis diversspecajn afiŝojn kaj surskribojn.

Sino. Nováková pacience kaj sinofereme vendadis la kongreseldonaĵojn estante helpata de finoj; Vycpálková kaj Řihová kaj aliaj samideaninoj.

Samtempe dek okupojn havis ĝenerala sekretario sro. Pitlík, kiu senlace de mateno ĝis nokto zorgis pri ĉiuj fakoj kaj sekcioj havante solan deziron ke ĉio marŝu kaj funkciadu bone. Centfoje oni vokis lin al telefono aŭ samtempe oni

demandis lin de ĉiuj flankoj, ke vere mi miris pri lia senlaceco. (Sro. Dro. Kamaryt admirinde kaj sporte gridis la kongreskunsidojn.)

En monŝanĝejo laboradis oficisto sro. Patočka kaj fino. Havelková (oficistoj de Československá dopravní kancelář), lerte vendadis la biletojn por la diversaj ekskursoj.

Blindulan au nevidulan kongreson tre bone organizis sro. prof. Stejskal kun prof. Macan, sino. Krausová, fino. Vlčeková kaj Kresová, al kiuj ni devas danki la admirindan koncerton de blindaj artistoj, kiuj per sia muzik kaj kantarto ravigis niajn aŭdsentojn kaj la koron dum kelkaj horoj.

»Nokto en Karlův Týn«, bela teatraĵo de Vrchlický, estis bonege tradukita de sro. Lukáš kaj sub gvidado de sportaj reĝizoroj sroj. Steinsberg kaj Dro. J. Pitlík prezentita en teatro de Vinohrady. La aktoroj estis niaj lertaj samideanoj sino. Kejzlarová, fino. Hodíková, sroj. Bunzl, Lukáš, Novák, Solykovič, Koutek, Šustr kaj sufloroj sroj. Kavalar kaj Hecký kiuj kvankam nevideblaj tamen estis sufiĉe audeblaj. Juĝante nur la belajn dekoraciojn kaj laŭ epokajn kostumojn, kiujn afable pruntedonis la direktoraro de Nacia Teatro, mi lasas la kritikon de la teatraĵo al la pri sportaj kaj ne tro severaj kritikistoj.

La loka kongresa komitato scios pli bone taksu kaj laŭmerite juĝi la laboron de multaj samideanoj, kiujn mi pro malbona memoro ne menciis ĉi tie petante pro tio ilian pardonon. Miaflanke mi dankas al ĉiuj por la afabla helpado en la preparoj de la kongreso.

Ankaŭ mi dankas al ĉiuj alilandaj samideanoj kiuj honorigis nin per tiel multnombra ĉeesto, helpante multege al Esperanta propagando en mia lando.

La ekskurso al Moravia Kras, kiu laŭ opinio de kelkaj samideanoj estis malfeliĉe organizita, estis transdonita en la manojn de duonoficiala entreprenon (Ĉedok), sed eĉ tiu estus bonege sukcesinta se la malbenita lokomotivo, sentestamenta heredaĵo de antikva aŭstria regno, ne estus kaŭzinta la kelkhoran malfruigon de la vagonaro kun ĉiuj ĝiaj konsekvencoj. La esperantista klubo en Brno kun sro. Barvič kaj turisma asocio zorgis pri la organizo de la ekskurso al la grotaj kaj ĉar mi ne partoprenis, mi ne estas kompetenta juĝi ilian aranĝon.

Kelkaj pri komfortamaj samideanoj sendis la lokomotivon al diablo (eble pro tio, ĉar en infero estas tre varmege kaj oni povus tie fandi la filokomotivaĉon kaj fari el ĝi kongresinsignojn ĉar iu samideano plendis ke la paperaj kongresinsignoj ne daŭras longe). Sed mi perfidos ankaŭ la vortojn de la junularo, kiu kontraŭe tre laŭdis la ekskurson kaj estas dankemaj al ĉiuj malhelpaĵoj. Precipe plaĉis al ili la mallarĝaj koridoroj en la grotaj, kiuj devigis ilin pli alproksimiĝi al ĉarmaj samideaninoj, per protekti ilin kontraŭ eventualaj danĝeroj. Unu el tiuj junaj malfeliĉuloj, ĉirkaŭ kvardekjara fraŭlo, rakontis al mi ke dum la reenvojaĝo li sidis inter du belaj estaĵoj kaj kiam li pro laceco alkliniĝis je unu flanko li aŭdis tre delikatajn korbatojn de sia najbarino kaj tuj li eksonĝis pri la Zamenhova poemo: En sonĝo principon mi vidis . . .

Kaj nun ankoraŭ kelkajn vortojn al la kritikemuloj. Ĉiu estas libera kritiki laŭplaĉe la organizon de la kongreso, sed oni ne forgesu pri tio ke la kongreson organizas ĉiam novaj samideanoj, kaj

ke al la kongreso multe malhelpis la senzorgaj kongresanoj kiuj ne resendis aliĝilojn aŭ ne respondis ilin sufiĉe precize rilate la loĝejon. Inter 2200 kongresanoj kiuj efektive partoprenis la XIIIan estis pli ol 500 kiuj tute ne respondis la aliĝilon kaj ĉirkaŭ 100 kongresanoj venis tute ne anoncite, kaj postulis esti unuavice servataj. Do precipe al tiuj oni devas danki kelkajn riproĉojn kiujn ni ricevis.

Plue oni ne forgesu ke la kongresanoj nomas sin batalantoj kaj la batalantoj ne iras al batalkampo kun gantoj, sed devas esti preparitaj por eventualaj malagrablaĵoj, kiujn la organiza komitato malgraŭ ĉiuj klopodoj ne estis kapabla eviti. Mi supozas ke ĉiuj organizintoj de la ĝis nun okazintaj kongresoj klopodis per ĉiuj siaj fortoj por bone organizi la kongreson, kaj same ankaŭ la kongresa komitato en Praha ne havis alian deziron ol atingi plejgrandam sukceson de esperanto kaj agrablighi al kongresanoj la restadon en mia republiko.

V. Cimr.

### Dro. FR. KOHOUT.

La 4. de tiu ĉi monato mortis en Praha konata fervora esperantisto Dro. Fr. Kohout post 56 jara laborplena vivo. Li estis alta kalkula oficisto, sed ĉiam li sin okupis en libera tempo je botaniko, matematiko kaj precipe filologio. Li konis kelke da ĉefaj eŭropaj lingvoj kaj en la lasta vivperiodo li dediĉis sian tutan filologian intereson kaj talenton al esperanto. Kiel kvieta kaj pacamanta viro li ekamis esperanton precipe por ĝia inferna ideo pacigi kaj fratigi ĉiujn homojn kaj naciojn, kaj allogita de tiu ideo, li laboris por esperanto en multaj direktoj. Plej multe li klopodis por forigi la mankon de fakaj terminoj esperantaj, kaj la fruktoj de tiu celaj studoj estas manuskriptoj:

1. Vortaro matematika-geometria, kaj
2. Provoĵo de la botanika biologia vortaro.

La esperantistoj el Praha akompanis la karan mortinton ĝis la tombo, kie lin adiaŭis krom aliaj parolantoj ankaŭ prezidanto de la Ĉeĥoslovaka asocio esperantista sinj. Eiselt.

oooo

OTAKAR THEER:

### LA PILGRIMANTO.

Longe pilgrimanto marŝis. Fine sub ĉielo  
stela  
li ĉe monaĥeja pordo staris en vestaĵ'  
malhela.  
Odorplena, dolĉe laca tempo estis, arboj  
floris.  
Anĝelusoj sonorkantis. Opalsanĝaj astroj  
gloris.  
Tiam haltis pilgrimanto. Trans mureto  
sin klinante  
la ĝardenon li rigardis... Kvazaŭ  
arĝentan revante  
sonĝon staris tie arboj, unu apud la alia  
kunigite en amika, bonvolema rond' magia.  
Depost jaroj en trankvilo ili majaj dum  
vesperoj

sin en arĝentlumo banis ĉe la dolĉa son'  
de l' sferoj...

Lia pena pilgrimado, bruloj, frostoj en  
memoro  
reaperis. Li ekstremis pro krutaĵ' de sia  
koro,

Ĉio, kion li promesis kaj mensogis, lin  
doloras.

Tuta vivo jam perdita! — kaj mallaŭte  
li ekploras.

Tradukis R. Fridrich.

## DIVERSAĴOJ

**Grava sukceso.** Ministerio de ĉeĥoslovakaj ŝtataj fervojoj publikigis en la »Oficiala bulteno de fervoja ministerio de respubliko ĉeĥoslovaka«, III. jaro nro 40. de la 10. de septembro 1921 sekvantan sciigon: Okaze de la XIIIa Universala kongreso esperantista en Praha, post sesjara interrompo estis ree fondita Internacia Asocio de Esper. Fervojistoj, kiun partoprenis preskaŭ ĉiuj branĉoj de la fervoja fako el 22 diversaj nacioj. La ĉefa tasko de la asocio estas, krom la propagando kaj instruado de la internacia helplingvo Esperanto, eldoni fakan esper. fervoj. vortaron, eldonadi esper. fervoj. fakan gazeton, faciligi al la asocioj la vojaĝadon en fremdlando kaj ebligi ilian restadon ĉe eksterlandaj kamaradoj (interŝanĝe) por edukigaj celoj k. t. p. La jara membra kotizaĵo estas 5 kronoj ĉeĥoslovakaj kaj 2 kronoj ĉs. por aliĝilo kaj enskribo, la samon pagos la fervojistoj neesperantistoj, sen gazeto. La aliĝilojn kaj membrajn kotizaĵojn akceptas: Vicprezidanto de la asocio Adolf Kašpárek, ĉefrevidento de la fervoja direkto, departemento VIII./2. en Praha, strato Sadová, sekretario de la asocio Josef Blažek, inspektoro de la fervoja direkto (kaso) en Olomouc, kaj kasisto de la asocio Emanuel Kubásek, adjunkto de la fervoja direkto en Plzeň, departemento VI./3. — La Ĉeĥoslovaka fervoja ministerio per la decido de 30. aŭgusto t. j., nro 45959-pres. 2., dissendis al ĉiuj direktoj de la ŝtataj fervojoj jenan cirkuleron: La ferv. ministerio konstatis, ke en kelkaj direkciaj distriktoj la fervojistoj el sia propra iniciativo ellernis la internacian lingvon Esperanto tiom, ke ili povas kompreni en tiu lingvo kun la traveturantaj fremduloj, sciantaj tiun lingvon. Ĉi tiuj klopodoj montris dum la antaŭnelonge okazinta esp. mondkongreso bonan rezulton. Tial rekomendu al la fervojistaro, kiu rilatiĝas kun vojaĝantaj fremduloj, dediĉi al la studado de esp. sufiĉan atenton, kaj decidante pri okupado de rilataj postenoj, prijuĝu ankaŭ, ĉu la kandidato scias ankaŭ ĉi tiun lingvon. — Laŭ la informoj, kiujn ni ricevis, ĉi tiu sukceso estas sekvo de la informa klopodo de so A. Kašpárek

**Ekzamenoj pri esperanto** antaŭ la Ekzamena komisiobno de ĈAE la duan de aŭgusto 1921 havis jenan rezulton: Ateston pri kapableco instrui esperanton en lernejoj kaj kursoj ricevis s-roj Dr. Hugo Jokl, profesoro en Wien, Stanislav Knížek, instruisto el Jičín, Alois Šikl, poŝta oficisto en Ji-

ĉin, kaj s-ino Ludmila Hanáková, edzino de instruisto en Vyškov. Ateston pri scio de esperanto ricevis s-roj Richard Blumauer, profesoro en Kralupy, Arnošt Janečka, komercisto en Vítkovice, Zdeněk Bár, studento en Štramberk, Josef Popper, librotenisto en Žilina, Jaroslav Prokop, gastejposedanto en Staroč, Jan Kratochvíla en Sered, kaj s-ino Magdalena Jelínková, instruistino de lingvoj en Hradec Králové.

**Pri la XIII. kongreso en Praha** skribis la ĝis nun aperintaj esp. gazetoj pli aŭ malpli favore. Ni kredas, ke la Loka kongresa komitato ne rifuzas pravan kaj senpartian kritikon, sed samtempe ni kredas, ke ĝi energie rifuzas la atakojn enhavitajn en la 7—8. no. de Esperanto-Praktiko kaj celitajn ne nur kontraŭ la aranĝintoj de la kongreso sed eĉ kontraŭ la ĉeĥoslovaka popolo. Kiamaniere la »Esperanto-Praktiko« raportas pri la kongreso oni juĝu el kelkaj eltiraĵoj: »Antaŭ la kongreso la urbestro admonis la loĝantaron kondukti afable kontraŭ la gastoj kaj precipe ne ĝeni la germanajn. Sed malgraŭ la admono okazis, ke du germanaj fraŭlinoj estis ĝenataj kaj atakataj de ĉefa soldato. Sinjoro, kiu defendis ilin rekomendis al ili ne paroli germane sur la strato. (Ĉi tiun mensogon bone karakterizas aliaj vortoj: »Prahanoj respondis miajn en esp. faritajn demandojn germane: Amuza fakto, kiun mi ofte spertis, ĉar la germana estas la sola fremda lingvo, kiun la ĉeĥoj scipovas. Pro tio ili ĝenerale uzas ĝin, se per sia lingvo ili ne povas sin komprenigi.«) — Cimoj en Praha ekzistas preskaŭ en ĉiu domo. Multaj kongresanoj ne povis daŭre elteni ilian turmentadon kaj jam post kelkaj tagoj forlasis la kongresurbon, aliaj ne dormis dum la noktoj kaj travagis la stratojn.« — Ĉeĥoslovakion la aŭtoro de la artikolo (so. Ellersiek) prezentas al la legantoj kiel landon de ŝtelistoj aŭ trompantoj: Sur Žofín la kelnero postulis pagon por ne trinkita limonado kaj preskaŭ ĉie oni penis eltiri monon el la poŝoj de fremduloj: en aŭtobuso, ĉe la grotoj en Moravia karsto, en tramo. Same agis ankaŭ la L. K. K. pri kiu so. E. parolas jene: Sino. Absolon aŭskultinte niajn protestojn (pri la pagado de enirbiletoj en la grotojn), rekomendis al ni: »Pagu provizore anstataŭ 30 nur 20 Kč. kaj poste repostulu la monon de la Loka kongresa komitato«. Tiu konsilo multe amuzis nin. La Kongresa komitato kaj repago, t. e. vera paradokso!« Pri la internacia kostumbalo li skribas: »Al la Loka komitato plaĉis fari la balon profitodona entrepreno ne antaŭe anoncinte tion. La Kom. pensis, ke tiu, kiu jam estas antaŭ la pordo de amuzejo ankaŭ pagos la anoncitan enirprezon, kiel estas kutimo en spektaklaj budoj sur foirejoj.« — Ĉi tiuj citaĵoj eble sufiĉas por montri la »homaranismon« de so. Ellersiek. Kiu volas legi la tutan »raporton« mendu ĝin ĉe la aŭtoro (Berlín S. 59. Wissmannstr. 46.). Ĝi kostas 2 germ. markojn.

**Prelato Dro Giesswein en Karlovy Vary.** Grandan ĝojon havis la Esperanto societo Karlsbad (germanlingva) merkredon la 20an de julio, vizitita de la hungara eminentulo monsinjoro Dro Gieswein, kiu estis bangasto en Karlsbad. La grupo aranĝis kune kun la ĉeflingva grupo »Svaz ĉesk.

esperantistů v Karlových Varech« festkunvenon, en kiu Dro Giesswein paroladis pri la tasko de Esperanto kaj de la Esperanta ideo en la nuna tempo, pri la interrilatoj de Karlsbad al siaj Esp. studoj — en Karlsbad li komencis antaŭ jaroj studadi Esperanton — kaj pri la signifo de la internacia banloko por la disvastiĝo de Esperanto inter la popolaro kaj inter la diversnaciaj bangastoj. Vigle interparolante kaj pace la trinaciaj samideanoj interkonsidis longtempe kaj la eminenta gasto promesis viziti ĉiujn kunvenojn dum sia kuraĉrestado.

**Kontraŭ komunistoj.** El Košice (Slovakio) ni sciĝas ke la komunisto partio tie aranĝis kurson de esp. por 70 magiarlingvaj lernantoj. Kaj jen iu raportis al la polica direkcio, ke la komunistoj uzas la kurson por siaj sekretaj kunvenoj. La kurson subite vizitis policistaro, kiu arestigis la aranĝantojn eĉ la partoprenantojn de la kurso. Post zorga demandesploro ili estis liberlasitaj, sed la esplorado estas daŭrigota kontraŭ ili. Tio okazis 26. sept. En tiu regiono de Slovakio regas nuntempe milita diktaturo (kaŭze de komunista movado) kaj tial por ĉiuj kunvenoj oni bezonas permeson de la polico.

**Esperanto kaj komerco.** Danke al klopodoj de sb. Kavan sukcesis enkonduki esp. en la lernejon por komercaj lernantoj en Plzeň. Instruas so. instr. Hahn du horojn semajne kaj red. Tittl kvar horojn sem.

**Korekto.** La ĉs. ministerio por eksterlandaj aferoj atentigis nin, ke nia sciigo pri so O. Adámek ne estis tute prava, ĉar li ne petis la subvencion por sia gazeto ĉe la nomita ministerio.

**Ne ofendiĝu!** Ĉu iam venis al Vi la ideo, ke Vi ĝis nun ne sendis la abonon por nia gazeto? Amiko kara, ne forgesu tion fari tuj, ĉar la administracio ĉiam senprokraste pagas la ricevitaĵajn fakturojn. Konsideru, ke la redaktoro kaj administristo laboras tute senpage, memoru tion, kion kaŭzis La Progreso: fondon de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista kaj la aranĝadon de la XIII. en Praha kaj Vi certe konfesos, ke La Progreso meritas Vian subtenon financan eĉ moralan.

ooo

## HELPU!

Ĉiu klera homo certe bone komprenas, kian valoron por la tutmonda kulturo havas la preso kaj unuavice la gazetoj informantaj la publikon pri la okazintaĵoj sur ĉiuj kampoj de la homaj interesoj. Ni ne dubas, se minacus pereu al la gazetoj, ke ĉiu civilizita homo senhezite batalus por ilia ekzisto. Kaj jen: ni esperantistoj havas gazeton servantan al la plej kompatindaj homoj, al blinduloj kaj tiu gazeto malaperos, se ne venos ĝustatempa helpo. Ĝi estas »Esperanta Ligilo«, tiel aŭde ĉiam legata de niaj blindaj samideanoj. Laŭ instigo de nia eminenta porblindula batalanto so. prof. Stejskal el Praha, kiu en la nomo de la I. Internacia blindula esp. kongreso sin turnas al ni, ni petas: Helpu al niaj blinduloj konservi ilian gazeton! Mondonacojn akceptos nia administracio kaj kvitancojn en La Progreso. Red. de La Progreso.

## DEZIRAS KORESPONDI.

(La enpresio kostas 2 Kč.)

(Klarigo: kor. = korespondas, int. = interŝanĝas, L. = leteroj, I. K. = ilustritaj kartoj, P. M. = poŝtmarkoj, G. = gazetoj, S. M. = sigelmarkoj.)

o o o o

**Sofia.** (Bulgario), St. Strandja 134, Ivan Gologanov, studento — let. kolektas P. M. kaj papermonon.

**Bydgozce** (Polio), Podolska 20., So. Aloysy Smura — dez. kor. kun ĉiulandaj fraulinaj, I. P. - P. M. respondas ĉiam kaj tuj.

**Osaka** (Japanio), Takasinoĥama, So. Ajsaka Tadasi — dez. kor. kun Ĉeĥoslovakinoj P. K. ils. respondas ĉiam.

**General Arenales** (Argentino), F. C. P., So. Manuel Noelle Güell sup. instr. dez. kor. kun gesamideanoj de ĉiuj landoj L. - P. K. ints. P. M. libroj, ilustritaj revuoj k. t. p. ĉiam respondas.

**London S. E. 23.** (Anglio), 121 Honor Oak Park, So Rotestro H. W. Volgt., int. I. P., L.

**Cluj** (Rumanio), Cal. Victori 64. So Colomanu Estefanu Marossiu, int. P. M., P. I. Petas propagandilojn kontraŭ rumanaj poŝtm. Li deziras ankaŭ interŝanĝi loĝejon kun fremda samideano por du monatoj. (Federacio de loĝeĝŝanĝo).

**Berkeley** (California U. S. A.), 2520 Charming Way, So John Ten Eyck Hlinkel koresp. per I. P. Ĉiam resp.

**Magdeburg** (Germ.) 4. Artileriestr., So Alfred Krause, interŝ. P. I. Resp. tuj.

**Škvřňany** (Ĉeĥoslovakio), 266. apud Plzeň, So. Václav Wolf, I. K. markoj bfl., popolaj

**Škvřňany** (Ĉeĥoslovakio) 36, so Josef Rojik dez. kor. L. precipe pri ekonomiaj aferoj. tipoj.

**Ústí n. Orlicí** (Ĉeĥoslovakio), Třebovská ul. 116., Anna Vavroušková — I. P. kaj L. kun fremdlandanoj.

**Bratislava** (Ĉeĥoslovakio), Radiostacio, So. leŭto. A. Slavík. Sendu rekom. 20—100 P. M. de via lando kaj Vi ricevos saman nombron ĉeĥ. (pi. g.)

**Stará Boleslav** (Ĉeĥosl.), So Jos. Poláček, instruisto, per L., I. K. int. gazetojn ktp. kun instruistoj el Francio, Anglio, Italio, Jugoslavio Polio, Norvegio, Svedio.

**Sciigo.** Fino Maria Renson el Verviers (Belgio) mortis! Ŝiaj korespondantoj povas koresp. kun ŝia frato so Fl. Renson. (Adreso la sama!)

So. Fr. Dejmek financa oficisto en **Praha II.**, 1036 eldonis belan geografian landkarton de Ĉeĥoslovaka respubliko, lando de XIII, en lingvo ĉeĥa kaj esperanta, amplekso 42×50 cm, kun diversaj statistikaj datoj; Riceveblaj ĉe eldonanto, lo ex. por Kč: 20.— unu ex. Kč: 3.—.

So. Jarka Ditrich, **Praha-Vinohrady**, Krkonošská 5., eldonis apartajn diversajn glumarkojn kun konvenaj devizoj kiel ekz. »Unu celo nin unuigas«. — »Ni ĉiuj estas unu familio«, »Kiu mokas, tiu ne komprenis«, k. a. Kunigitaj

100 diverspecaj glumarkoj kostas Kč 5.—, kaj 500 pecoj Kč 23.—.

So. Jiří Frankenberg Del. U. E. A. Bytčica u Žiliny, sendas fotografajojn de la XIIIa, kolekton de 12 diversajn bildojn kontraŭ Kč 36.—, neafranke!

**Senpage** sendos al Vi transpagilon por ke Vi povu transpigi la sumon de Kč: 4.— por 100 esperantaj glumarkoj; So. Alojzo Janza, Žilina, poŝtako 26, Slovakio.

**Provolání!** Esperantistě z Ostravska, Mistecka, Jičinska, Opavska, Těšínska a Hlučinska se žádají, aby své přesné adresy oznámili: Esperantista sekretario de la nordokcidenta Moravio en Vitkovice-Ostrava.

»Esperanto« oficiala organo de Univ. Es. Asocio en Genève kaj membrototizoj oni povas en Ĉeĥoslovaka respubliko abonpigi per unua peranto So. F. Kavan, Plzeň V.

Ĝus aperis:

## „KIO ESTAS UNIVERSALA KO-FRAMASONIO?“

(Universal Freemasonry, What is it?)

Broŝuro 11×15 c M. 16 paĝa. Donas informojn pri la celo de Framasonio kaj pri la ambauseksa Ordeno „Le Droit Humain“. 11 Ĉapitroj: Enkonduko. Kio estas Framasonio? Origino. Organizo. La Skota Rito. La allaso de la virino La ordeno de Universala Ko-Framasonio, Le Droit Humain. Internacieaj Laboristoj en la Framasonio. Deklaracio. Adresoj.

Havebla kontraŭ unu respondkupono ĉe la Esperanto Fako ĉe **Sro. F. FAULHABER, Bergerstraat 103I. Amsterdam, Nederland,** kiu ankaŭ donos pliajn informojn.

## Ĉeĥoslovakoj abonu

bonan, kaj bele ilustritan gazeton „BRATISLAVSKA POŠTA“ gazeto enhavas esperantan anglulon redaktatan de samideanino **Josefina Marečková, Bratislava, Kopáčekská 25.** Abonprezo Kč 44.— jare.

Ĝus aperis 3.— a eldono de

## BES-a ADRESARO DE ESPERANTISTOJ EL ĈIUJ LANDOJ.

Bela praktika manlibreto 90—pĝa, kun 1000 adresoj kaj ilustraĵoj. — Prezo 9.— Kč, alilande 150 Fr. sv., pagebla en poŝtm. au respondk. Eldonis:

BOHEMA ESPERANTO-SERVO,  
MORAVANY,

Bohemujo, Ĉeĥoslovakujo.

Eldonanto: Esperantista klubo en Plzeň. — Responda redaktoro: B. Tittl, Plzeň, Radyňská ul. Presis: Laborista presejo, Plzeň.